Scienca Revuo Vol.45 (1994)(1)—164

LINGVA KOMUNIKADO KIEL PROBLEMSOLVADO

Prelego prezentita en la Internacia Kongresa Universitato dum la 75-a Universala Kongreso de Esperanto, Havano, 1990.

Otto Prytz (Norvegio)

La teorian bazon de ĉi tiu prelego mi dankŝuldas al Erica C. García, argentindevena lingvistino edukiĝinta kaj laborinta en Usono (ĉefe en la Columbia Universitato de Novjorko) kaj nun laboranta en Leiden, Nederlando. Mia konatiĝo kun ŝia ĉefverko, «*The role of theory in linguistic analysis; the Spanish pronoun system*» (la rolo de teorio en lingvistika analizo; la hispana pronoma sistemo), signifis por mi lingvistikan revelacion. Bedaŭrinde mia blindeco forte limigas al mi la eblecon orientiĝi pri la faka literaturo eĉ de mia propra fako, do mi ne scias, ĉu lastatempe aliaj publikigis vidpunktojn similajn al tiuj, kiujn mi prezentos ĉi tie.

La homo ĉiam klopodas trovi koherecon. Eĉ kiam ĝi ŝajne mankas, la homo tendencas ĝin **krei**. Kiam iu misparolas, la aŭdantoj ĝenerale mense «korektas» la misaĵon aŭ simple ignoras ĝin, ĉar ja ĉio cetera koheras. Kiam oni pensas, ke oni havas sufiĉe da donitaĵoj por eltiri koheran konkludon, oni saltas al tiu konkludo, t.e. oni faras **inferencon**.

Inferencado estas baza aktiveco en la ĉiutaga vivo. Se vi eniras ĉambron, en kiu vi vidas tablojn kun puraj teleroj, manĝiloj kaj glasoj, vi facile inferencas, ke tie oni manĝos. Aliflanke, se vi vidas **malpurajn** telerojn, manĝilojn kaj glasojn, makulojn sur la tablotukoj ktp., vi inferencas, ke oni jam manĝis. La fakto, ke blindulo

Scienca Revuo Vol.45 (1994)(1)—164

povas orientiĝi en la spaco malgraŭ la manko de tiu senso, kiu normale donas 80% de la tuta sens-impresaro, estas klarigebla per tio, ke ni vaste kompensas per inferencado la informon, kiun la vidantoj ricevas per la vidpovo (rekte observante aŭ lege). Ekzemple, mi intencas iri sur strato, kiu normale havas multan trafikon. Mi kompreneble ne povas vidi la nomŝildon nek konstati, kio troviĝas ĉe la transa trotuaro. Sed mi eble rimarkas, ke la trafiko ne estas tiom densa, kiom mi atendis, kaj anstataŭ la atenditan deklivon supren mi trovas ebenaĵon aŭ deklivon malsupren. Tio sufiĉas, por ke mi konkludu, ke mi ne estas ĉe la dezirata strato. Se mi tiam aŭdas tramon, mi eble havas sufiĉe da donitaĵoj por ekscii, ĝuste kie mi estas, inferencante surbaze de la direkto, de kie venas la sonfonto, kaj kien ĝi moviĝas.

La serĉo de kohereco rilatas ankaŭ la deĉifradon de lingvaj mesaĝoj: se lingva eldiro estas plursenca, oni emas elekti la interpreton, kiu plej koheras kun la cetera kunteksto. Ekzemple, se iu uzas la vorton «plumo», parolante pri birdoj, ĉiuj inferencas, ke temas pri birda plumo. Sed se la sama vorto estas uzata en parolo pri skribado, ĉiuj same nature inferencas, ke temas pri skribilo. Iafoje, ekzemple ĉe vortludoj, oni esprimas sin tiel, ke la ricevantoj samtempe faru plurajn malsamajn inferencojn. Miaopinie tiu kapablo de la lingvo kaj de la lingvouzantoj estas argumento kontraŭ la generativa modelo, kiu supozigas, ke la profunda strukturo de frazo estu unusensa. La fenomenon, ke unu surfaca strukturo povas esti derivita de pluraj eblaj profundaj strukturoj, oni emas atribui al pli-malpli hazardaj koincidoj.

Deĉifrado de mesaĝoj surbaze de lingvaj eldiroj estas speco de «problemsolvado», kiun oni realigas ĉefe per inferencado. La signifo de lingvero ĝenerale estas tiom vasta, ke ĝi nur aludas la ĝustan deĉifron. Por ebligi ĝustan deĉifron oni devas esprimi la signifojn necesajn

Scienca Revuo Vol.45 (1994)(1)—164

kaj sufiĉajn, por ke la deĉifranto faru la konvenajn inferencojn. Tio estas nenio alia ol la principo pri neceso kaj sufiĉo, tiom konata en la Esperanto-movado. Por preni faman ekzemplon el **Lingvaj Respondoj**: se stalzorgisto diras: „Mi manĝigos la ĉevalon", natura inferenco estas, ke li igos ĝin manĝanta. Sed se buĉisto aŭ kuiristo diras la saman frazon, la plej natura inferenco estas, ke li igos ĝin manĝata. El tiu ekzemplo evidentiĝas, ke la signifo de la Esperantaj afiksoj estas tre ĝenerala, kaj ke la reguloj, kiujn kelkaj fervoruloj donis pri ilia uzo, ne vere estas reguloj, sed nur priskriboj de la plej oftaj inferencaj procezoj, al kiuj submetiĝas la afiksoj.

En kelkaj kazoj necesas inferenci **kontraŭ la signifo de morfemo**. En multaj lingvoj (ne en Esperanto) la gramatika finaĵo de ĉiuj finitivaj verboformoj enhavas informon pri la persono kaj nombro de la subjekto. Tian informon oni do neeviteble devas doni, eĉ kiam la verbo ne havas subjekton. Tiel okazas ĉe verboj esprimantaj veteron. En la hispana, ekzemple, la finaĵo de la vorto «llueve» (pluvas) esprimas ne nur prezencan indikativon, sed ankaŭ ke la «pluvanto» estas triapersona kaj singulara. Ne estas hazarde, ke ĉe tiaj nepersonaj aŭ unupersonaj (pli bone sensubjektaj) verboj oni elektas ĝuste tiun formon.

Tie ĉi konvenas kelkaj vortoj pri «markiteco». Ofte, en dumembra opozicio unu membro estas markita, t.e. esprimas eksplicite la ĉeeston de la koncerna trajto, dum la alia membro estas nemarkita, t.e. esprimas la **eblan**, sed ne la nepran ĉeeston de la koncerna trajto. Tial oni povas analizi la opozicion, per kiu oni esprimas la seksojn en la Esperantaj substantivoj: «ĵurnalistino» nepre estas virino; «ĵurnalisto» povas esti viro aŭ virino. En la opozicio singularo/pluralo, singularo estas la nemarkita membro. La frazo „Ŝi havas biciklon" ne necese indikas,

Scienca Revuo Vol.45 (1994)(1)—164

ke ŝi havas nur unu biciklon, sed simple, ke ŝi estas bicikloposendanto. En la opozicio inter la tri gramatikaj personoj, la unua estas markita kiel la parolanto, la dua kiel alparolato, kaj la tria estas markita nek kiel parolanto, nek kiel alparolato, do ĝi estas la nemarkita membro de tiu opozicio. Tial ĝuste la tria persono singulara, estante la malplej markita formo, estas tiu, kiu malplej ĝenas ĝustan inferencadon ĉe sensubjektaj verboj.

En la plimulto de la ĝermanaj lingvoj oni en ne-imperativaj frazoj eĉ devas meti eksplicitan subjekton, kaj tiu, kiu malplej ĝenas ĝustan inferencadon, estas neŭtra singulara pronomo signifanta «ĝi». Sed en «prezentaj» aŭ montraj frazoj, ekzemple en la angla kaj dana lingvoj, oni anstataŭ tian pronomon uzas demonstran aŭ montran adverbon signifantan «tie». Angla ekzemplo: „There is a letter for you" (estas letero por vi). Tiu adverbo kompreneble helpas inferenci la montran elementon de la mesaĝo: ĝi ne montras al iu difinita loko, kiel indikus ĝia signifo.

Multo el tio, kion ni konsideras gramatikaj reguloj, estas nenio alia ol taŭgaj strategioj; kombino de la elementoj plej taŭgaj por estigi en la alparolato inferencon kiel eble plej proksiman al la intenco de la parolanto. Por lernanto de fremda lingvo, tamen, povas esti konvene parkeri tiajn «regulojn» por ne bezoni ĉiam elcerbumi la saman komunikan strategion. Analoga kazo estas la enkapigo de matematikaj formuloj. La unuan fojon, kiam mi renkontiĝas kun tia formulo, mi ŝatas scii, kial ĝi estas vera. Sed poste mi ne bezonas memori la pruvon: sufiĉas scii, ke iam mi komprenis la pruvon, do mi povas trankvile uzi la formulon, ne klopodante re-trapensi la pruvon ĉiufoje.

Ekzemplo el Esperanto: Ni lernas kiel gramatikan regulon, ke post «por ke» ĉiam estu u-formo. Tio ne estas

Scienca Revuo Vol.45 (1994)(1)—164

regulo; simple estas la plej kohera formo esprimi intencon: la prepozicio «por» montras al la celato, kaj en la posta substantiva frazo plej taŭgas tiu verboformo, kiu esprimas **volon**. Tamen, se mi uzus **alian** verboformon, ekzemple indikativan, post «por ke», vi certe komprenus min, ĉar la intenco estus esprimata en «por». Nur vi devus ignori en la inferencado la signifon de **fakto** enestantan en la indikativa formo.

Zamenhof havis ideon pri tio, ke la lingvon konsistigas sistemo de limigita nombro da eroj aŭ iloj, per kiuj eblu komprenigi teorie senfinan nombron da mesaĝoj. En *Lingvaj Respondoj* li skribis (respondo 140 laŭ la eldono de Waringhien 1962):

„Ellabori plenan detalan gramatikon estas afero tute ne ebla. La verkado de tia gramatiko postulus grandan serion da jaroj, sed en la rezultato... tia gramatiko ne sole ne faciligus la lernadon de la lingvo, sed terure ĝin mal-faciligus! Se mi eĉ laborus tutan centon da jaroj kaj publikigus libron enhavantan kelkajn milojn da paĝoj, mi ja neniam povus antaŭvidi teorie ĉiujn dubojn kaj demandojn, kiuj povus aperi ĉe la lernantoj, kaj se mi ian punkton klarigus ne sufiĉe precize, mia klarigo nur **erarigus** la lernanton. Ĉar mi laboris super Esperanto grandan serion da jaroj, tial en **mia propra kapo** la tuta lingvo kun ĉiuj ĝiaj nuancoj havas formon tute **difinitan kaj precizan**; sed se mi volus eblajn nuancojn **klarigi teorie**, mi nur malklarigus la aferon kaj terure ĝin malfaciligus...

Laŭ mia opinio estus necese, ne ke mi verku teorian detalan gramatikon, sed ke mi verku kiel eble pli da praktikaj libroj (diversaj literaturaj tradukoj); el **tiaj** ĉiaj libroj ĉiuj povus lerni la lingvon kun ĝia tuta vera kaj unuforma spirito multe pli bone, pli facile kaj pli precize ol el la plej dika gramatiko."

Scienca Revuo Vol.45 (1994)(1)—164

El tiu respondo oni povas tiri almenaŭ du konkludojn: unue, ke Zamenhof antaŭvidis, ke eventuale aperonta *Plena Analiza Gramatiko* fariĝos ĝena gramatiko, kaj due, ke estas prava la tezo, kiun Marjorie Boulton lanĉis en prelego dum la UK en Brajtono 1989, nome ke Zamenhof ne hazarde, sed tre konscie elektis, kiajn literaturaĵojn li traduku.

Tio, kion mi diris pri la signifo de la Esperantaj afiksoj, validas ĝenerale, do ankaŭ por la etnaj lingvoj kaj ankaŭ por la signifo de la **vortoj** aŭ leksemoj. Por ke la lingvo estu taŭga esprimilo, la signifo de ĝiaj eroj devas esti tiom ĝenerala, ke ili povas esti uzataj en diversaj kuntekstoj kaj okazigi diversajn inferencojn. Same kiel oni povas analizi fonemon en fonologie distingajn trajtojn, oni klopodis analizi la lingverojn en semantike distingajn trajtojn, sed ĝenerale malsukcesis, ĉar oni ĉiam trovis iun kunteksto, en kiu la proponitaj trajtoj ne taŭgis. Kion oni klopodis analizi, laŭ mia opinio, ne estas la **signifo** sed la **inferencoj**, kiujn estigas la signifo — kune kun la cetera kunteksto. Vortaroj tradukas, difinas aŭ klarigas ne la **signifon** de vorto, sed **ordinarajn inferencojn**.

Unu inferenco tamen povas fariĝi tiom kutima, ke ĝi influas la **signifon** de la koncerna lingvero, estigante semantikajn ŝanĝojn. Ekzemple, en la amerika hispana lingvo multaj vortoj, kiuj origine rilatis al mar-trafiko, alprenis pli ĝeneralan sencon. Pro la fakto, ke en la unua kolonia tempo la vojaĝado ĝenerale okazis sur-akve, oni ne bezonis konscie inkluzivi la maron en la inferencojn, do ekzemple la vorto «flota» (floto) ekinterpretiĝis kiel «transportilo», kaj en Bolivio ĝi nun signifas «aŭtobuso». En Meksiko, same kiel en Bolivio, la ŝarĝkapacito estis decida faktoro en la elekto de vorto por «aŭtobuso», sed oni elektis alian vorton, nome «camión» (kamiono).

Scienca Revuo Vol.45 (1994)(1)—164

Homoj el malsamaj kulturoj alprenis malsamajn inferencajn kutimojn. Eĉ inter denaskaj parolantoj de unu etna lingvo tio povas kaŭzi miskomprenojn. Kolombianino, vojaĝanta sur ŝipo inter Barcelono kaj Majorko (Hispanio), aĉetis trinkaĵon kaj petis „un pitillo". La leksemo «pit» povas elvoki la ideon «fajf-», «fajfil-», «tubo por fajfi (fluto)» aŭ simple «tub-». «-illo» estas diminutivo. En Hispanio la signifo — aŭ ĉefa inferenco — de tiu kunmetaĵo estas «cigaredo», sekve oni donis al ŝi cigaredon. Sed ŝi, nenion komprenante, diris: „No, no quiero fumar, quiero un pitillo" (Ne, mi ne volas fumi, mi volas «pitillon»). Kion ŝi volis, estis suĉpajlo. Kiel kompletigan informon mi menciu, ke cigaredon oni nomas en Kolombio «cigarro», kaj ke suĉpajlon oni nomas en Hispanio «paja». Eble oni povas diskuti, ĉu tiu ekzemplo ilustras malsamajn inferencojn aŭ malsamiĝintajn signifojn. Tion oni ne povas diri pri la verbo «cancelar»: ĉiuj konsentas, ke ĝi signifas «nuligi, forigi». Sed iam en Peruo mi bezonis iom da tempo por fari la ĝustan inferencon, kiam iu demandis min: „¿Quiere usted cancelar el desayuno?" (Ĉu vi volas nuligi la matenmanĝon?) Ofte inferenco de «cancelar» estas «malmendi», do mia unua penso estis, ke oni demandis min, ĉu mi volas malmendi la matenmanĝon. Sed tio ne estus kohere kun la cetera kunteksto reala, ĉar mi jam mendis kaj eĉ **manĝis** la matenmanĝon. Mi posta inferenca provo estis pli sukcesa: Nuligi aferon oni povas ankaŭ, zorgante, ke restu nenio plu farota. Laŭ tio, en la situacio, en kiu mi troviĝis, la nura maniero nuligi la matenmanĝan aferon estis **pagi** por la manĝo, kion mi ankoraŭ ne estis farinta.

Se miskomprenoj povas okazi eĉ inter homoj, kiuj interparolas en sia komuna gepatra lingvo, la risko de miskomprenado certe estas pli granda ĉe komunikado en **fremda** lingvo. Kiel dirite, ĉe lernado de fremdaj lingvoj

Scienca Revuo Vol.45 (1994)(1)—164

ni ofte lernas inferencajn procezojn kvazaŭ ili estus gramatikaj reguloj. Oni do klopodas instrui al ni la ĝeneralan inferencadon de la denaskaj parolantoj de la koncerna lingvo, t.e. ilian manieron solvi la komunikajn problemojn. El tio sekvas, ke por povi komuniki en fremda etnolingvo, t.e. fari la inferencojn necesajn por sukcesa interkompreniĝo, necesas ekkoni grandan parton de la eksterlingva kunteksto, kiu konsistigas la kulturan fonon de la parolantoj de tiu lingvo. Tiu punkto ankoraŭfoje ilustras, ke amasa lernado de unu fremda etnolingvo akcelas kulturan imperiismon. Aldonu al tio, ke la inferencaj kutimoj povas varii de regiono al regiono en la areo de unu lingvo. Do estas pli malfacile regi la komunikadon en disvastiĝintaj lingvoj ol en ne-disvastiĝintaj.

Kaj kio pri Esperanto, kiu rolas pli kiel fremda lingvo ol kiel gepatra? Unuavide la risko de miskompreno estus pli granda en Esperanto, kies ĉefa funkcio estas tiu de translingva kaj transkultura komunikilo. Lernante Esperanton, oni ja ne lernas kultur-specifajn inferencajn kutimojn, do oni emas solvi la komunikajn problemojn laŭ siaj propraj kutimoj. Ili tamen povas diferenci de la kutimoj de aliaj, kaj la rezulto povas esti miskompreno pro la fakto, ke la alparolato inferencas alimaniere, ol la parolanto atendas. Sed duavide, parton de la komunika strategio konsistigas konsidero al la alparolato, do estus atendeble, ke Esperanto-parolantoj esprimu sin tiom klare, ke miskomprenoj ne ekestu malgraŭ malsamaj inferencaj kutimoj. Tiu lasta faktoro certe gravege kontribuis, por ke Esperanto ne disdialektiĝu. Kiam oni rimarkas, ke aliaj havas aliajn inferencajn kutimojn ol oni mem, oni pli atentas pri la signifo mem de la lingveroj.

Norvega denaska Esperantistino nomiĝanta Sunfloro, eĉ senintence instruis sian patron esprimi sin

Scienca Revuo Vol.45 (1994)(1)—164

en pli bona Esperanto. Kiam oni ne rekonas la ĉirkaŭaĵon, oni norveglingve diras „jeg kjenner meg ikke igjen" (mi ne rekonas min). Promenante kun sia filino, la patro diris ĝuste tion: „Mi ne rekonas min, ĉu vi rekonas vin?" Kaj ŝi respondis, tute logike, „Jes, mi rekonas min, mi estas Sunfloro."

Se oni faras demandon, kiu enhavas nean vorton, oni riskas miskompreni la respondon. Se oni ekzemple demandas slavlingvanon: „Ĉu vi neniam antaŭe vizitis Kubon?", kaj li simple respondas „jes", tiu jeso rilatas al la demando tia, kia ĝi estas formulita: „Jes, mi neniam antaŭe vizitis Kubon". Se li respondas „ne", li neas al la demando tia, kia ĝi estas formulita: „Ne, mi jam vizitis Kubon plurfoje (do ne estas vero, ke mi neniam vizitis Kubon)". Se oni faras la saman demandon al latinidlingvano aŭ ĝermanlingvano, la responda strategio estas inversa: „ne" signifas „ne, mi neniam antaŭe vizitis Kubon", do oni kvazaŭ insistas pri la neado inkluziva en la demando. Se oni respondas „jes", oni subkomprenas, ke oni ja vizitis Kubon, do oni per la jeso eliminas la nean elementon de la demando. Cetere en kelkaj lingvoj (la franca, la germana kaj la skandinavaj) ekzistas speciala respondvorto («si», «doch» resp. «jo») uzata por respondi «jese» al nea demando.

Malgraŭ ardaj diskutoj pri la interpretado de pasivaj participoj en Esperanto, ĉiuj ŝajnas konsenti pri tio, ke ĝenerale la diversaj lingvouzoj ne kaŭzas miskomprenojn. Tamen unu fojon mi spertis miskomprenon pro malsamaj interpretoj de la participoj. Tio okazis en Oslo la 15an de decembro 1959, dum festkunveno okaze de la 100-jara jubileo de la naskiĝo de Zamenhof. La festparolon faris en Esperanto Ivo Rotkviĉ el Jugoslavio, kaj tradukis ĝin Johan Hammond Rosbach el Novegio. Rotkviĉ diris: „Dum la historio de la homaro la lingva problemo multfoje estis solvata". Rosbach tradukis „estis solvata"

Scienca Revuo Vol.45 (1994)(1)—164

per „har vært løst". La unua el tiuj vortoj estas prezenco de verbo, kiu signifas „havi", sed kiu ankaŭ uziĝas kiel helpverbo por formi perfekton kaj pluskvamperfekton. La dua vorto estas participo, kiu principe povas esti aktiva perfekta aŭ pasiva sen pli specifo, de la verbo „esti". La tria vorto estas samspeca participo de la verbo „solvi". La norvega traduko klare komunikas, ke oni multfoje solvis la lingvan problemon. Se el la cetera kunteksto de la Esperanta originalo same klare evidentiĝis, ke temas nur pri **sensukcesaj provoj** solvi ĝin. Rotkviĉ uzis «-ata» aspektisme, volante esprimi i.a. senrezultecon, dum Rosback tempisme interpretis ĝin kiel esprimon de samtempeco kun la helpverbo „esti".

Ĉu la inferenca modelo povas ĵeti novan lumon sur la participan demandon? Mi supozas, ke jes, ĝuste pro la hipotezo pri la ĝeneraleco de la signifoj. Ni supozu, ke la a, i, kaj o de la indikativaj tempoj kaj participoj signifas nun- aŭ samtempecon, antaŭecon kaj postecon, respektive, ĉu absolutajn, ĉu rilatajn al alia verbo. Tio klarigas la uzon de la sama tempo en malrekta parolo kiel en rekta, eĉ kiam la dirverbo estas en la pasinta tempo; tiam la tempo de la verbo aŭ verboj de la malrekta parolo rilatas al tiu de la dirverbo. Ĝi ankaŭ klarigas, ke participo uzata kiel pura adjektivo ĝenerale esprimas absolutan tempon (mortanta / mortinta / mortonta), dum en la konjugacio la tempo de la participo rilatas al tiu de la helpverbo.

Kiam homo, por kiu aspektaj konsideroj formas gravan parton de la inferencaj kutimoj, aŭdas aŭ legas helpverbon sekvatan de participo — aktiva aŭ pasiva — esprimanta samtempecon, la insisto pri la samtempeco nature igas lin inferenci neperfektan aspektan. Kiam tiu sama homo aŭdas aŭ legas helpverbon sekvatan de participo esprimanta antaŭecon, li same nature inferencas perfektivan aspekton, se la

Scienca Revuo Vol.45 (1994)(1)—164

kunteksto ne igas lin koncentri sian inferencadon pri la antaŭtempeco (tian kunteksto povas konsistigi ekzemple la adverbo «jam»). Kiam homo, kiu ne kutimas meti aspektajn konsiderojn en la inferencadon de konjugaciaj formoj, renkontas la kombinon «estis skribanta», li verŝajne tamen inferencas specon de neperfektiva aspekto, ekzemple daŭron, ĉar la lingvosistemo disponas ankaŭ pri la simpla formo «skribis». Do la insistado pri la samtempeco havas ian komunikan intencon. La **pasiva** formo «estis skribata», male, ne necese elvokas tian inferencon, ĉar por esprimi simplan pasivan agon necesas kombino de helpverbo kaj participo, kaj tiu lasta **devas** esprimi aŭ samtempecon, aŭ antaŭecon, aŭ postecon, kaj la formo, kiu malplej ĝenas inferencon de simpla ago, estas tiu de samtempeco, kiu estas la nemarkita tempo.

Malgraŭ la ĵus diskutitaj problemoj ni konstatas, ke inter eŭroplingvaj Esperantistoj miskomprenoj apenaŭ okazas. Sed la eŭropaj lingvoj tamen reprezentas relative unuecan kulturon. Lingvistoj eĉ diras, ke la eŭropaj lingvoj reprezentas baze unu pensmanieron, kaj ke la tradukado inter eŭropaj lingvoj ne prezentas grandajn problemojn. Sed ekster tiuj lingvoj oni pensas en tute aliaj kategorioj. Precipe de aziaj Esperantistoj ni aŭdis la akuzon, ke ni traktas Esperanton tro eŭropece, kaj similajn ideojn esprimas Claude Piron en *La Bona Lingvo* (kiun mi tamen ne trovis la okazon legi ankoraŭ). Mi volas fini la prelegon per la jena, iom defia demando: ĉu ni povas plibonigi nian komunikan strategion, konsiderante, ke ekster-eŭropanoj eble havas aliajn inferencajn kutimojn ol ni, kaj tiel faciligante al ili la problemsolvado, kiun signifas ĉia lingva komunikado?